Mireille Grosjean

Ekzemplo de “rezilienco” – fortikeco

La vorto “rezilienco” ekzistas en la franca kaj en la angla (eble en aliaj lingvoj ankaŭ) kaj tiu vorto eble baldaŭ eniros en nian vorttrezoron. Ĝi signifas, ke iu persono havas apartajn kapablojn por denove stariĝi kaj feliĉe vivi post malfacila vivmomento, funebro, atako, perforto aŭ alia tre doloriga travivaĵo.

Sylke Pan (1973) emis moviĝi. Ŝi brilis en plonĝado (el saltobreto enakven), en arta gimnastiko, en uzo de trampolino/saltotabulo, en dancado. Ŝi frekventis diversajn cirkolernejojn kaj finfine iris al Berlino



por progresi en tiu arto. Tie ŝi diplomiĝis. Kun grandaj sukcesoj en la magia lumo de cirko ŝi saltis de trapezo al alia trapezo kune kun sia edzo. Dudek jaroj da sukcesa kariero, parte en cirko Nock.

En 2007 ŝia vivo brutale ŝanĝiĝas: okazis akcidento, ŝi falis. Ŝi frakasis sian dorson (la dekan kaj dekunuan vertebrojn dorsajn) kaj perdis la uzon de siaj kruroj. Ŝi nun devas uzi rulseĝon. Tamen ŝi plu volis moviĝi, kiel en sia junaĝo. Ŝi ekuzis “handbike”, kuŝantan biciklon, kie oni movigas la vehiklon per la manoj.

Hazarde mi aŭdis ŝin ĉe la svisa radio kaj mi devis enorme admiri ŝin. Tiom da kuraĝo ŝi havas! Mi decidis intervjui ŝin por vi, karaj legantoj de *Juna Amiko* kaj karaj aŭskultantoj de muzaiko. La diskuto okazis en la franca, ĉar ŝi kaj mi

loĝas en franclingva Svislando. Do mi tradukis por vi kelkajn ŝiajn frazojn.

“Ni ĉiuj povas elekti nian manieron alfronti nian destinon. Estas nia respondeco kaj morala devo pozitive uzi nian vivon. Homo havas liberan elekton: ni povas decidi, ĉu niaj problemoj fariĝos marĉoj, kiuj manĝos nin, aŭ nova elano por salti pli alten. Kiam mi ekzercis plonĝadon, mi konstatis, ke mi devis eniri akven kaj atingi la grundon por tie puŝi min alten denove. En ies vivo okazas la samo: se venas frapo, oni uzu ĝin por atingi la surfacon denove kaj eĉ iri pli alten. La malfacila momento en la vivo donas al ni forton. Ni ne simple naĝu kun la fluo, ni agu laŭ nia volo, ni iru nian vojon celitan.”



Sylke plu parolas: “Ĉiu persono havas talenton kaj povas, devas kontribui al bonfarto de la mondo. Tiuj personoj, kiuj daŭre plendas, alportas nenion al la mondo.”

Nun ŝi estas ĉampionino en manbiciklo… ŝi grimpis bicikle sur la 15 plej altajn alpajn pasejojn… Ŝi ofte biciklumis por kolekti monon por kuracaj programoj kiel SPART. Ŝi vivas kun konstantaj doloroj. Tamen ŝi diras : “Se mi koncentriĝas sur miajn dolorojn, tio utilas al nenio. Mi devas lerni distanciĝi de mia dolora korpo. Se iu plendas, tio similas al kraĉado sur donacon. La vivo estas donaco, tiom bela donaco. Se mi pensas pri miaj brakoj, kiuj bone funkcias, tio ebligas al mi resti pozitiva.”

Ŝi gvidas kaj konsilas diversajn sportoskipojn kaj grupojn el kunlaborantoj de entreprenoj (coaching) kaj prelegas multe. Ŝi verkis libron, kiu aperis en aprilo 2018. “A la conquête de nouveaux sommets” (konkerante novajn pintojn). Ŝi daŭre sportumas, ĉar ŝi ŝatas tion, kaj ĉar tiu aktiveco estas saniga por la sanaj personoj kaj ankoraŭ pli por la handikapitoj, por ilia sangocirkulado, bona staro aŭ sido, fortikigo de certaj muskoloj ktp.

Ni trovu kuraĝon el ŝia ekzemplo!